

# LA PLEJ FORTA VOĈO DE LA PACO

- POEMARO -

# LA PLEJ FORTA VOĈO DE LA PACO

Kolekto de Poemoj

el

*El Popola Ĉinio*

FREMDLINGVA ELDONEJO
*PEKING 1952*

# ENHAVO


Libero al Ni Venas (*Tjen Kjen*) ..... 5
Printempo en Vilaĝo (*Ćang King-tien*) .... 6
Provizo Amasiĝu kiel Monto (*Ćang Ming-čjuan*) ..... 8
Floron kontraŭ Floro (*Ćang Ming-čjuan*) .. 10
Ne Estas, ke Neniu (*Ćang Ming-čjuan*) .... 12
Usonaj Mortigantoj (*Movado*) ..... 14
Hontinda Fiasko (*Movado*) ..... 17
Varmporta Letero (*Ku Ju*) ..... 21
Batalanto ĉe l' Landlimo (*Ćaŭ Jang*) ..... 23
La Plej Forta Voĉo de la Paco (*Śe Fang-ju*) . 26


## Apendico


I. Biografiaj Notoj pri la Aŭtoroj ..... 51
II. Klarigoj ..... 54

# Libero al Ni Venas

**Tjen Kjen**

Malgaja
Popolo,
Ni nepre devas bataladi!
Septembre ekster la fenestro
Sur la kamparo
De Azi',
Libero
El trans sang-inundo,
El trans kadavroj frataj
Alflugas al ni
Kiel tempesto;
Kiel hirundo.

**Trad. S. J. Zee**

# Printempo en Vilaĝo

**Ĉang Ĉing-tian**

La prunarboj floras, milda briz' aromas.
La vilaĝo krevas je jubil' freneza.
Brikojn oni portas, kaj kotkaĉon kirlas.
Hej ho! falegas ritme ramo peza.
Tie oni vokas: Surmetu la trabon!
Kaj ĉi tie: Venu starigi kolonojn!
La liberaj kamparanoj vivas gaje
Kaj konstruas interhelpe por si domojn.

Dika flava bov' kun brilglata harar'
Tiras la fekaĵo-ĉaron tra l' kampar'.
Ĝi rapidas tiel foje kaj refoje,
Kaj aliaj ankaŭ, pli ol dek, survoje.
Vipo klakas en la man' de knab' gracia.
Venas jen knabin' tenante bridon de alia.
La du ĉaroj renkontiĝas ĉe laget',
Alparolas la knabino kun ridet':
"Frato, volu veti, kiu pli rapide pelos!"
"Ho silentu, brunjo! Ĉiel ajn mi vin superos!"

Kvazaŭ ciklono, rado-akvumilon
Rondtiras ferkolora azenid'.
Maten-akvum' valoras ja fekaĵon,
Jen la tritiko kreskas kun rapid'.
Surkampe sonoradas gaja rid'.
Fratino zorgas bedojn, frato bruton,
"O franjo, franjo, ŝtopu tuj la breĉon!
Bedlimon jam forlavos la torent'."
"Ha fraĉjo, ne kriaĉu tiom!
Mi kantas al vi *Ruĝas Orient'*."

Milda printemp' moligas la sukecan teron,
Kotonan kampon plugas jen sesdekjarulo.
Plugilon puŝas avo, nepo tiras bruton,
Laboron ili partoprenas kun plezuro.
"Mia infan'! prizorgu bone nian bruton,
Vi post rikolt' ricevos belan kamizolon."
"O, kara avo, ne maltrankviliĝu!
Pliaĝa mi kondukos jam traktoron."

trad. S. J. Zee

# Provizo Amasiĝu kiel Montoj

**Ĉang Ming Ĉjuan**

Ekster fenestro koko krias noktomezon,
En sonĝ' mi vidas monton da draŝita gren';
Kaj ellitiĝas kaj vestiĝas haste, kiam
En stal' antaŭmatene blekas la azen',
Mia unua filo nove edzigita
Dormas profunde post riglita pord',
La dua dekkvarjara, silentadas
Malgraŭ plurfoja voko en la kort'.

La tutan domon mi nun vekas fine.
Plugilo preta. Bovo sub la jug'.
Surkampe la matena brizo refreŝigas,
Kaj nigra tero molas kun abunda suk'.
Multe da homoj jam laboras sur la kampo
Kaj la laboro progresadas kun plenflug'.
De mateniĝo ni laboras ĝis tagmezo,

Kaj ĝis la sunkliniĝo al sudokcident'.
La plugiloj, fosiloj, ŝpatoj kaj semiloj
Ekbrilas fulme de momento al moment'.
Trrr! hot! hot! Hej ho! hej ho!
Ŝvito saturas tute la tolbluzon
Kaj de vizaĝo en la teron fluas.
Ĉie homkrioj kaj vipklakoj gaje bruas.

Laboras mi ĝis sunsubiro,
Ĝis la ĉielo brilas de stellum'.
Mia edzino vokas min al vespermanĝo.
"Hodiaŭ nokte", mi respondas, "mi finplugos
Nepre ĉi tiun pecon sub la bela lun'."
"Ŝajnas, ke plijuniĝas vi je tridek jaroj!"
"Kiam ja devus mi labori, se ne nun?"

La tero estas nia tero
Kaj nia estas la ĉielo.
Ĉu mi bedaŭrus pri la ŝvit' kaj fort'?
Mi nur atendas la alvenon de aŭtuno
Kune kun la superabunda gren-rikolt'.
Grenejoj superplenos, grandaj kaj mal-
grandaj,
Vazoj kaj kestoj, ĉiuj pleniĝos ĝisrandaj.
Rigardu!
Tritik', hordeo, gaŭliang, rizo, pizo,
Kotono kaj terpomo kaj maizo!
Mi volas,
Ke amasiĝu kiel montoj la provizo!

Trad. S. J. Zee.

# Floron kontraŭ Floro

**Ĉang Ming Ĉjuan**

Super saliko pendas hela luno.
Plektante pajlĉapelojn subsalike,
Ŝultro ĉe ŝultro du fratinoj
Interbabilas flustre tre amike.

"Sur la ĉiel' duope flugas hirundetoj,
Kaj la ostardoj vivas sur sablej' en paro;
Kial prokrastas via festo geedziĝa,
Post la gefianĉiĝo pasis jam plenjaro?
Elstaras vi en rondo de fratinoj,
En milici' sonoras nomo lia,
Inter mil kaj mil gejunuloj belaj
Jen vi ekplaĉis unu al alia.
Kontentas vi je via 'memelekto',
Kaj ankaŭ la gepatroj ĝin favoras.
Sed strange! post via gefianĉiĝo
Nur ĉiam pli fervore vi laboras.
Jen li kondukas interhelpan grupon,
Kaj ne ripozas dum la tuta tago,
Dum vi nin gvidas ĉapel-pajlplektajojn

Plekti kaj eĉ forgesas pri l' stomako.
La prokrastitan feston jam atendas
La tutvilaĝo kun malpacienco,
Melonon tromaturan sur la bedo
Lasante, kion planas vi en menso?"

"Ĉijare ĉie disvolviĝas produktado,
Modelojn oni jam elektos de laboro,
Akvo malsupren kuras, homoj—supren,
Do kiu ne sopiras al honoro!
Junulliganoj estu pioniroj!
Fianĉon mi defiis pri konkuro.
Ĉiu decidis penlabori gvide
Por esti elektita modelulo.
Jen elektita el vilaĝ' kaj el distrikto
Kaj eskortita gubernien kun muziko,
Kun ruĝa flor' surbruste, en kunveno
Ni sidos kune antaŭ la publiko,
Verdaj folioj flirtas laŭ la vento
Kaj ruĝaj floroj ravas la okulojn.
Prenante nin kiel modelojn siajn
Ĵuros kun gesto ĉiuj gejunuloj.
La jubil-fest' fariĝu geedziĝa festo,
La hero-glaso estu glaso de amoro,
Kaj guberniestro estos nia atestanto,
Ni tiam interŝanĝos floron kontraŭ floro!"

Elĉinigis S. J. Zee.

# Ne Estas, ke Neniu. .

**Ĉang Ming Ĉjuan**

Ne estas, ke neniu
Kantas pli melodie,
Ne estas, ke neniu
Amas min pli pasie,
Ne estas, ke neniu
Estas pli bela,
Ne estas, ke neniu
Estas pli klera—
Divenu,
Per kio estas katenita mia kor' fiera?

Surbranĉe kreskas floro,
Surakve naĝas pramo,
Kaj sur progreso via
Baziĝas mia amo.
La flor' leviĝas kun la branĉ' kreskanta,
La pramo—kun akvoleviĝ' subita,
Se ĉiun tagon ol alian
Via progreso estos pli rapida,

Do mia amo por vi ankaŭ
Fariĝos tag-post-tage pli solida.

Trad. S. J. Zee.

# Usonaj Mortigantoj

## Movado

Kiu grasigis ja Ĉiang Kaj-ŝek, la hundaĉon?
Kiu per sesmil milionoj da dolaroj
Subtenis lian klikon? Kiu, ŝajnigante
Sin interpaciganto, kaŝdirektis en bataloj?
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciu!

Kiu per tankoj kaj bazukoj armis la Ĉiang-trupon
Por premsufoki la revolucion per komplotoj?
Kiu ja fondis la SACO-an koncentrig-tendaron
Kaj masakradis milojn kaj dekmilojn da patriotoj?
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciu!

Kiu, dum la cent jaroj, iam **malkaŝe sub-**
**premis**
Nian revolucian forton per **milit-manovro,**
Tamen pli ofte sonĝis ja **narkoti la spiriton**
De la popolo per veneno en **sukera kovro?**
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, **sciu!**

Sur strat' en Kunming (昆明), **sur sensona**
**revolvero**
Kaj en Ĉazetung (潼萍洞), **Ĉungking sur**
**katenoj rustaj**
Ja klare gravuriĝis ĝia **nomo aĉa**
Kaj sang' makulis de **sennombraj ĉinoj**
**justaj.**
**Kiu? Kiu? Kiu?**
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, **sciu!**

Kiu de la malnovaj **ŝuldoj ankoraŭ** ne
kvitas
Kaj novan ŝuldon ree kreas jam **kun sangaj**
**manoj?**
Kiu etendas demon-ungojn en **Nordorienton,**
Invadas nian landon per **frenezaj aero-**
**planoj?**
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, **sciu!**

Kiu la sangon de koreoj trinkas?
Kaj kiu trinkas la sangon de ĉinoj?
Kiu la sangon trinkas de la tuta mondo
Kaj eĉ de siaj samlandanoj kun obstino?
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciu!

Kiu? Kiu estas la rabisto kiu rompas la mondpacon,
La kanajlo, kiu malhonoris niajn fratinojn per forto,
La ĉefa sangavida malamiko de l'ĉina popolo
Kaj ŝtelisto kiu rampas serpente al nia pordo?
Tiu! Tiu! Tiu!
Tiu imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciu!

Trad. S. J. Zee.

# Montinda Fiasko

## Movado

Fripono finfine forĵetas ridŝajnon,
Kaj de la rabisto nudiĝas animo,
Hieraŭ li diris: alies internan aferon ni ne interferos,
Hodiaŭ Korean popolon atakas jam en malproksimo.
En la pasintec' la rabisto sin kaŝis ankoraŭ post masko,
Kaj en Filipinoj, Greklando, Ĉinio buĉadis nur per la agentoj,
Sed nun li jam montras sin sur la scenejo senmaske,
La monstro abomena kun lupaj ungegoj kaj dentoj.

Jen li municion, provizon, militkonsilantojn alsendas,
Jen li mobilizas la fortojn aeran kaj maran per urĝa dekreto,

Li anglojn kaj aŭstralianojn, fidelajn
helpmanojn, ordonas,
Kuniri masakri la pacan popolon en
fora landeto.

—Ĝi estas en la orienta duonsfero, vi—en
okcidenta,
Teritoriojn viajn apartigas ja la vasta
Pacifiko,
Nun vi invadas Koreion kaj bombardis
Koreion,
Ĉar ekminacas vian 'sekurecon' tiu fora
respubliko?!

Rabisto nudigas jam sian animon
Kaj Hitler revivas per fremdaj
kadavroj—
Ĉu Truman, ĉu Dulles, ĉu Johnson,
MacArthur—
Ja ĉiam li mem, krom la etaj lipharoj.

Sed la batalantoj koreaj sentimaj
Disrompas la sonĝon de la agresulo.
—Pjongjang okupos ni jam en tri tagoj—
Malfeliĉe la kvaran jam falis Seulo!

Estas vi, Dulles,
Kiu enrampis nur antaŭ nelonge
tranĉeon ĉe l'fronto,
Kun teleskopo en man' fanfaronis super-
landokarte,
Fuĝas hodiaŭ kun vost' subtirita,
kovrita de honto;

Kaj vi, MacArthur,
Kiu ĵus flugis al front' por direkti
bombardon persone,
Krias hodiaŭ per akra falset' hipokrite
—Por humanec', humaneco al milit-
kaptitoj Usonaj;

Kaj vi, militkonsilantoj,
Kiuj je la civiluloj senkulpaj direktis
masakron,
Nun forlasinte vagonojn sin savas naĝante
Kiel ĉasataj hundaĉoj, forgesas eĉ sian
podagron;

Estas vi, Acheson, Truman,
Kiuj pretendis engluti Koreion sen peno
Tamen hodiaŭ vekite ektrovas kun miro
Ke ĉe l' malfronto kaj fronto boliĝas
geheno:

Tiu nuligas la semajnofinan ferion
Kaj la alia forlasas tuj la gaŭfokortoĵ,
Tiu ankoraŭ en frako por pompa bankedo,
Tempon ne havas alia demeti negliĝon
marbordan,

Ĉiuj aĉuloj kunsidas en la Blanka Domo, la
rabistonesto,
Kaj de l' ĵurnalistoj tra malantaŭpordo
ŝteliras skrupule.
A. P. raportas: vetero malhelpas agadi
Usonan armeon.

U. P. raportas: batataj soldatoj sin savas de l' fronto vetkure.

Fiasko hontinda! ho, fiasko hontinda!
Antaŭ tutmondo la militagentoj
Jen publikigas la konton de siaj sangkrimoj
Kun la bankroto de imperiistaj taĉmentoj.

Elĉinigis S. J. Zee

# Varmporta Letero

— Al la Ĉina Volontularo —

**Ku Ju**

Mi ekmemoras pri vi kiam mi malsatas,
Kaj en malvarm' mi pensas pri vi en foro,
Min entuziasmigas la novaĵ' pri l' venkoj,
Nun volas mi varmigi vin per mia koro.

Neĝegis kvin plentagojn, inko glaciiĝas
Kaj sur fenestroj pompas prujno-filigrano.
Sed dum mi ekmemoras pri la fronto,
La ĉambro nebuliĝas kvazaŭ vaporbano.
Dum mi ekmemoras pri vi,
Ho! jen malglaciiĝas la peniko en la mano.
Vi kovras vin per neĝo
Kaj dormas sur glacio.
Sed via koro ekflamiĝas
Ekmemorante pri l' patrio,
Kaj jam degelas la surkorpaj neĝo kaj glacio.

Antaŭ vi tremas eĉ la frost' mem.
Kaj genuiĝas la senhontaj malamikoj kun vekrio.

Ho, karaj kamaradoj!
Jen sendas mi al vi leteron.
Kaj sendas kune mian koron:
Per la letero mi varmigas viajn manojn.
Kaj per la koro mi varmigas vian koron.

Elĉinigis S. J.

# Batalanto ĉe l' Landlimo

**Ĉaŭ Jang**

Hieraŭ ĵus eliris mi el la batalo
Kaj la batalon gajnis mi per vivorisko.
Hodiaŭ mi gardstare ĉe l' landlim' patria
Estas ankoraŭ batalanto batalpreta.

Kvankam jam ĉesis nun batal' enlanda,
Mian armilon mi ankoraŭ firme tenas.
Militon mi ne serĉas, mi nur malpermesas
La batalfajron ree tuŝi la patrion.

De l' centro ĝis bordero de la patrolando
Tiom da montoj kaj riveroj mi trapasis.
Postrestas ĉie piedsigno de batalo,
Kaj ĉiun colon de la patroland' mi amas.
Banditojn pelĉasante sur nubtuŝaj montoj
Tage kaj nokte mi marŝadis kaj batalis:

Dezertaj montoj estis mia lit' soldata,
Sovaĝaj herboj varme kovris mian korpon.

Perforte mi trapasis la riverojn grandajn,
Vade postĉasis mi fuĝantajn malamikojn,
Somere marŝis mi aŭdace tra l' inundo
Kaj vintre mi ne timis eĉ la frostan akvon.

Mi partoprenis ankaŭ sangbatalojn kampajn
Kaj mia sango fluis sur la Huajhaj-ebeno.
El la tranĉe' mi saltis kaj dum kuratako
La malamikojn enterigis en la neĝo.

Mi migris dekmil liojn tra la patrolando
Kaj vidis kiel ĝi vastegas kaj fekundas:
La rizo en la sudo brilas kiel perloj
Kaj en la nord' tritikkampar' ondumas ore.

Mi bataladis inter la popolo vasta,
Kaj hurakriis al mi ĉiuj popolanoj,
Ili min bonvenigis kvazaŭ sian fraton:
En patroland' troviĝas ĉie mia hejmo.

Hodiaŭ gardstarante ĉe l' landlim' patria,
Mi enamiĝas jam al la vilaĝ' tiea.
Antaŭe ĝi vivadis longe en mizero,
Nun fum' feliĉa flirtas super la tegmentoj.

Ne plu kverelas kamparanoj kun edzino,
Nun ĉiu havas jam por si grenkampon verdan.
Matene ili iras ĝoje al kamparo,
Vespere hejmenvenas min ridsalutante.

Kaj la infanoj de l' lernej' vilaĝa pasas
Apud mi ĉiutage, la gajuloj bravaj!
En la buŝetoj tondras ĉiam bravaj kantoj
Kaj noblan revon havas la infanaj kapoj.

Rabistoj vane penas blovi batalfajron
Al nia lando kaj trarompi ĝian pordon.
Ili intencas porti al ni la pereon
Kaj fari jam cindraĵon el la domoj niaj.

Por la patrio mi trairis cent batalojn,
Kaj por ĝi jam sennombrajn kuglojn mi elpafis.
Ĉiam venkante mi elpaŝis el batalo
Kaj en ĉiu batalo kaptis malamikojn.

Hodiaŭ sur landlimo de la patrolando
Gardstaras mi ankoraŭ por la sankta tero.
Kiu kuraĝus tuŝi mian patrolandon,
Tiun mi sendos al diablo senprokraste!

Tradukis S. J.

# La Plej Forta Voĉo de la Paco

**Ŝe Fang-ju**

## I

La voĉo el Stokholmo
estas la plej forta voĉo en la mondo!
Ĝi kvazaŭ uragano
de la bordo de Balta Maro
levas trombe sablon el Gobia fundo.

Ni, Donbas-ministaro,
PLA-soldatoj en Ĉinio,
negrosklavoj en Sudameriko
aŭ fiŝistoj sur norvega maro,
ni estas simplaj homoj.
Niajn nomojn
la magnatoj de Wall-strato
ja aŭdis neniam,

sed sur la pacalvoko
ĉiu el ni subskribas
nomon sian.

Ni kun admonominaco fingra je ilia nazo
malpermesas ĉerpi per obusingo
nian freŝan sangon
por soif-estingo.
Ni malpermesas uzi
Misisipiajn kamparanojn
por ataki
Ukrajnajn kolĥozanojn.

Ni estas simplaj
sed neatakeblaj homoj,
ĉar nia nomo
estas
Popolo!
Ni estas en la mondo
la plejmulto absoluta,
kaj nia voĉo
la plej forta voĉo en la mondo tuta.
Pacon ni ne almozas kun plortono,
sed militi malpermesas
per ordono!

## II

Malpermesu
al la rabistoj en frako
kaj murdistoj kun kruco surbruste
veti en hazardludo homajn vivojn kaj feliĉon

aŭ per sango mezuri sian riĉon!
En Pentagon en Vašingtono
ilia militmapo
    mencias jam Pacifikon
        kiel enlandan lagon de Usono,
    kaj faras Japanion kaj Filipinojn
        ĝiaj aerodromoj.
Ili intencas ekdetrui morgaŭ
    la tutan mondon per fajregoj
kune kun ĝiaj ĝardenoj,
        bibliotekoj,
        kaj kindergartenoj.
Ili volas vidvinigi
    niajn amatinojn.
    Kaj la patrino mizera
        larmos kordolore
    kiam ŝi aŭdos
        la balbutantan orfon
            voki sian paĉjon plore.
Malpermesu al ili,
malpermesu ĉiujn ĉi krimojn!

Usono
estas tiu ĉi malica lando.
Ho, kie estas viaj Lincoln kaj Jefferson?
Mi legis la verkojn kiujn vi donis al la mondo:
        la *Deklaracio de Sendependeco,*
        la romanoj de Mark Twain,
        la Whitman-verkaro poezia.

Iam mi pensis stulte:
unu kapitano falis,
nepre leviĝos alia.
Sed, Usono,
kiam mi metas apud *Herbofolioj*
femurbildojn de Hollywood-aj filmparadoj
aŭ la *Deklaracion de Rajtoj*
apud Truman-paroladoj,
kia degenero!
Mi aŭdas ke viaj prapatroj
ploras sub la tero.

Ho, Usono!
La torĉo en la mano de Libero
kiun vi starigis ĉe l' bordo de Atlantiko
estingiĝis jam.
Viaj verdaj herbejoj
estas stampitaj de piedsignoj de Satan'.
En viaj hospitaloj estas kulturataj
mortigaj bakterioj,
homĉasajn hundojn dresas
viaj menaĝerioj,
kaj per invento de mortigiloj
konkuras viaj laboratorioj.
Viaj gazetoj aperigas bildojn de
klubdancistinoj
kiuj allogas virojn al rekrutiĝo per kisoj,
dume sur foraj insuloj en Pacifiko
soldatoj, kiuj eskapis morton dum la Dua
Mondmilito,

apogante kapon sur ŝtono glacia
songas dolĉan songon pri returno al Kalifornia.

Ho, Usono,
tio estas malpermesita!
la kantoj de Robeson peze resonas,
kaj via popolo vin admonas.
Antaŭ la kasejo de bankoj
staras dommastrinoj
    kun malbone nutritaj sufinfanoj.
Banknotojn ili ja ne posedas.
Kio pluvas sur vin en inundo,
    estas sange kaj larme skribitaj sloganoj.
Ili ne pagos imposton
        por atombombo kaj homĉasa hundo.

Iliaj filoj
    ne povas morti sur kampo de fremdlando.
Mi vidas kajolaboriston sur telegrafa stango
alte levanta la pacflagon sur Novjorkaj stratoj.
Kaj en miaj oreloj resonas ankoraŭ la ploro
                de l' virino,
kiu jetis sin kape al la kolono de Blanka Domo
aŭdante ke l' armeo estas sendita al Koreio
kaj petegis Truman'on
redoni al ŝi la solinfanon.

Usono!
Nepre eksplodos via vulkano,

se Truman kaj Marshall
insistas je sia krimago.
Ministoj rampos el siaj ŝaktoj
kun dinamito kiun ili uzas en minejo,
fervojaj laboristoj veturigos ĉiujn lokomotivojn al Vaŝingtono,
soldatoj reen marŝos de la fronto,
negroj frakasos la elektroseĝojn,
kaj dommastrinoj kuros el la kuirejo.

Se hodiaŭ eksplodus milito,
ho Usono,
jam morgaŭ Blankdomon kaj Pentagonon atakos via civito,
ĝuste kiel rusoj trarompis la pordegon de l' Vintra Palaco
dum la lastaj tagoj de la Unua Mondmilito.

## III

Muĝas vento,
furiozas la maro,
Pacifiko estas plena de kaŝitaj rifoj.
Usono, direkton ŝanĝu via ŝipo
antaŭ la tumulta ondaro!
La Tarukaj herooj
jam fosis por vi tombon
en Filipina kokos-arbaro,

apud la francoj
    vian kadavron enterigos
Ngujen Ĝiap kaj Ho Ĉi Min,
kaj la lafo de Fujijama
trarompos sian neĝoĉapon
    kaj cindrigos vin.

Malpermesite! Malpermesite ien ajn trud-iri!
Se vi kuraĝus
    invadi Ĉinion,
tie ĉi kvarcent sepdek milionoj da popolanoj
pretas vin mortbati kiel vulpon
kaj por militakirajo
                vian felon
                    deŝiri.

La fajro kaŭzita de Truman
estas bruliganta la grenkampojn de Koreio.
En koreaj valoj freŝas ankoraŭ la sango hieraŭa
    kaj ilin inundas jam sango nova.
Kiam forflugis Usonaj aeroplanoj
infano rampas sur la sangumita korpo de l' patrino
kaj suĉas la sangon fluetantan
                el la mamoj.
Apud Han-Rivero
inter krutegaj montoj
    koreaj popolanoj
altorentas kiel flusondoj,
kaj partizanoj

eksaltas el herbaro
celante al vi
    pafadon sian,
kaj per fosilo batas kamparanoj
    kapon vian.
Popolo——
por tiu ĉi nomo
neniam estis loko
en Truman-militscienco,
sed estas ja tiu sama popolo,
kiu, ĵus hieraŭ subskribinte
    sian nomon sur la pacalvoko,
ekprenas hodiaŭ aŭtopafilon
    kontraŭ malamika provoko.
Por Truman du solaj vojoj:
kapitulaci antaŭ Paco
aŭ
klini sin ĉe l' militkrimula tribunalo.
Al la tuta mondo, jen de la popolo
    solena proklamo!
Kiu ne aŭdus tiun ĉi voĉon
    enterigos sin
        en la memfarita flamo.

For militon!
Sur la kajo de Sanfrancisko
bruegas la adiaŭ-plorado de edzinoj al edzoj,
                de patrinoj al filoj.

For militon!

El dormo vekiĝas ankoraŭ infanoj
de la fajfado de Hitleraj plungo-bombadiloj.

For militon!
For de Okcidenta Eŭropo
la Unuigita Ĉefstabo
kaj la Marshall-Plano kanibala!
For de Koreio
ĉiuj Usonaj soldatoj
kun la ŝtelita el Lago Sukceso
flago de l' Unuigita Naciaro!
For de Tajvan
la Sepa Ŝiparo!

For militon!
Venas krioj de Usonaj kaptitoj
el korea aisaŭdiga stacio.
Forkuras tutpelotone kaj tutrote
Usonaj soldatoj en Japanio.

For militon!
pro la feliĉa vivo de sennombraj familioj,
pro la baloj de sabat-vesperoj,
pro niaj lernejoj kaj teatroj,
pro niaj kulturitaj teroj
kaj industrioj!

For militon!
ke sennombraj Tanja-j daŭrigu lernadon en
naŭa klaso.

ke Liu Hulan vivu ĝis nun kaj fariĝu
labormodelo,
ke PLA-soldatoj laboru per plugilo aŭ martelo.

For militon!
Tio kion la popolo elektas
ne estas skarabo de Kolorado,
sed traktoro kaj grenkulturado.

For militon!
Truman kaj Churchill,
ili tremu antaŭ la plej forta voĉo de la paco!
Barbaraj persekutoj
ne povas kaŝi ilian internan timon.
Antaŭ Ku Klux Klan kaj ĝendarmoj,
antaŭ tankoj kaj larmiga gaso,
pacbatalantoj
levu pli alten vian standardon
por savi la mondpacon!

Ho, kamarado McCarthy en Novjorko!
kiam via okulglobo estis elfrapita
kaj vi kuŝis en hospitalo,
popolanoj murmuris vian nomon,
ĉar vi estas ĉampiono de la pactendaro.

Ho, lernantino sur Damaska strato!
kiam vi estis arestita de policanoj,
la pacalvokiloj en viaj manoj
transkuris en pli multaj manoj.

Patrinoj en Vieno!
kiam vi laŭte kriis por paco
antaŭ la Usona Ambasadorejo
kaj falis en policistajn manojn,
ĉu vi aŭdis ke la patrinoj en Parizo
antaŭ samspeca konstruaĵo
kriis la samajn sloganojn?

Pacgvidantoj en Angora!
kiam vi estis turmentitaj en milittribunalo,
pacorganizoj en urboj kaj vilaĝoj de Turkio
prosperiĝis kiel printempa floraro.
Pacbatalantoj!
batalu kun pli heroa spirito,
kaj je la nomo de paco
deklaru militon kontraŭ milito!

## IV

La okuloj de l' popoloj
turniĝas al Sovetlando,
kvazaŭ post granda sekeco
oni vidus pluvarkon sur la ĉielrando.
La standardo de Sovetio
ardigas la batalvolon de milionoj kaj milionoj;
la sonorilo de Kremlo
firmigas la kredon de ĉiuj pacsoifantaj homoj.
Memorigu la militagentojn la lecionoj en historio.

Sur tiu malnova tero
kiel tajdo alfluis
la armeo de la juna reĝo de Svedio,
tamen la malvenko de Karlo la Dekdua,
kiel tajdo deflua
lasis ĉie post si konkojn,
la kadavrojn de la granda armeo.
Sur la verto de nubskrapaj Alpoj
Napoleono foje staris,
tamen sur la neĝkovrita tero de Rusio,
lia montsimila armeo
en polverojn disfalis.

Ho, tiuj malnovaj historioj
estis forgesitaj de Hitler,
sed la Hitleran malvenkon
ja freŝe memoras ĉi generacio.
Hodiaŭ la Sovetiaj herooj
staras fronte de l' pacfronto.
Kiuj ajn kuraĝus ataki el oriento,
kiel ties tombŝtonoj servos la Siberia arbaro;
kiuj ajn kuraĝus ataki el okcidento,
estos enterigitaj en Balta Maro.
La teron de Sovetio
saturis la sango de invadantoj
kaj ankaŭ la sango de propraj heroaj gefiloj.
La intervenantoj el dudek kvar landoj
superverŝis la nove naskitan respublikon
per pluvego el ŝtalo kaj fajro,
la faŝistaj banditoj superverŝis ankaŭ

la potencan respublikon
per samspeca pluvego,
tamen kio alte staras hodiaŭ kiel Monto Uralo
ne estas amasigita fajro kaj ŝtalo,
sed la provizo de sennombraj grenejoj.

Truman kaj Churchill, ili memoru
ke Sovetia popolo estas ne atakebla,
ekde la tago de Caricin
ĝis hieraŭ, la tago de Stalingrad.
Kiu ajn sovaĝa bruto
kuraĝus ĝin tuŝi iel,
estos frakasita
sub rebat'.

Memoru la militagentoj tiujn ĉi lecionojn,
memoru ili pri Stalingrad.
la urbo el sango kaj karno,
la urbo el ŝtalo,
la urbo heroa
kun la tiea
heroa defendantaro!
La tieaj heroaj defendantoj jam hejmeniris
demetinte milituniformon.
Majoro Sabulov ne mortis,
sed revenis kun la resaniĝinta Anja
kaj instruas historion en gimnazio.
Kiam la luno grimpas super arbopintojn,
tra strato lamplume banita,
ili iras brakon ĉe brako,

por viziti Baletan Teatron
ĉe la prezentado de "Cigna Lago".
La akvo de Volga fluas senĉese.
Ĝi estu atestanto de ĉio ĉi tio.
Staĥanova heroo
ekprenante pafilon
jam estis defendanto de Stalingrad,
anoj de Junula Gvardio
antaŭ la germanaj maŝinpafiloj
morton akceptis aplombe kantante "Internacion."
Kiam ekvenis paco,
oni tuj dediĉis sin al urba rekonstruad'.
Aŭskultas popolanoj de la tuta mondo
la bruon venantan el Sovetio.
Tio estas melodio de fabrikaj motoroj,
kaj en kolĥozoj ruliĝantaj traktoroj.
Estas la popolo kiu pri nova vivo kantas,
kaj Volga kiu al paco vokantas.

Paco estu donata al laboremaj popolanoj,
al Volga
kaj ĉiu loko kiun ĝi trakuras!
Paco estu donata al la hidroelektra stacio
de Kuibiŝev kaj Stalingrad'!
Paco estu donata al varmo,
al lumo,
al urbo kaj kamparo,
al vero,
al belo,
al bono de la tuta homaro!

## V

Ho! hodiaŭ estis nova stimulo por mi,
Kiam mi legis radio-informon el Moskvo.
Mi preskaŭ kuris sur la straton
kaj laŭte kriis al la nokta urbo
por veki ĉiujn
    kiuj dolĉe dormis post laciga labortago,
ke ili eksciu la novaĵon
        pri Dnepra hidroelektra stacio
        pri Ukrajna kaj Krimea kanaloj,
        kaj pri la konstruaĵo de irigacio.
Ili ĝojos same kiel mi,
ĉar la ĉi tieaj popolanoj
jam lasis ĉian maldolĉon al historio,
kaj dediĉas ŝviton kaj kreadon al la estonteco;
ĉi tie ni 470,000,000 homoj
ankaŭ kun sinforgesemo de bolŝeviko
konstruadas la estonton de sia juna respubliko.

Tremu antaŭ ni la malamikoj,
kaj aplaŭdu por ni amikoj!
Sur nia tero
progresas eventoj senprecedencaj,
Antaŭ unu jaro la naskiĝo de la popola res-
                                    publiko
anoncis jam la bankroton en Orienta Azio
de la intrigoj militagentaj.
Bonvenigas pacamaj popoloj

la kvaronon de la tutmonda frataro
kun vivuoj kaj floroj.

Mia patrolando
estas kiel leviĝanta suno
kun radianta lumo.
Mi amas lin, mia patrolando,
malfaciloplena,
tamen tiel bela,
kun persepektivoj vastaj kiel junulo.
La suno patrolanda estas tiel varma
ĝuste ĉar la pasinta nokto estis
fantomsvarma.
La popolo patrolanda hodiaŭ ĝojas elkore
ĝuste ĉar hieraŭ ili
suferis dolore.

En mia hejmlando
inundon sekvis sekeco.
Kamparanoj manĝis Kuanjin-teron
kiam elĉerpiĝis arboŝelo,
kaj poste kadavron de frato
kiu mortis je malsato
kiam mankis al ili eĉ Kuanjin-tero.
Grandaj knabinoj ne havante pantalonon
vendis sian virgecon por funto da terpomo.
Maljunuloj ne havis ĉerkon post sia morto.
Junuloj migradis el kamparo al urbo,
kaj de urbo al la marbordo,

post tiam sub la nomo de "porkidoj",
pogrande en kvaraklasaj kajutoj
de ŝipoj kun Usona aŭ angla flago,
al Malaja Insularo aŭ Sanfrancisko
oni transportis ilin plue
por grasigi la fremdlandajn gumarbaregojn
kaj orminojn
per sia sango
kaj poste formorti senbrue.

En la rivero de mia hejmlando
ankris tiom da japanaj batalŝipoj kiom haringoj.
Dumtage la ĉefstrato resonis de bruo de ledŝuoj
kaj tintado de glavingoj,
nokte klakadis ofte katenoj de arestito.
Kiam mia fratineto ploris en noktomezo,
patrino nur frapis la randon de lito flustrante:
"Venas japanoj!"
kaj ŝi jam ĉesis singulti en subito.
Ĉiutage mi iris al lernejo kun la timo,
ke ekvenus el la Japana Konsulejo iu knabaĉo
kaj pikus mian ventreton per papertranĉilo,
kiel li faris al mia kamarado kiel apaĉo.
La japanaj ŝipoj apenaŭ forpeliĝis,
jen la riveron ĉe mia hejmurbo
kovris batalŝipoj Usonaj.
En la sama vespero
kiam ni festis pro la kapitulacio de Japanio,
ebria Usona maristo
rompis la kapon al du rikŝokulioj

per botelo viskia.
Post tiu tago la Usonaj kirasitaj aŭtoj
levis ĉiam polvonubon sur la stratoj en urbo nia.
En tiuj plej mallumaj kaj malĝojaj tagoj
por elserĉi sunlumon
mi iam travojaĝis la patrion.
Sed mi vidis nur ke en Vanpu
estas pli multe da Usonaj batalŝipoj,
kaj Usonaj aeroplanoj kovras
la bluan firmamenton de Pepino,
kaj en neĝŝtorma vespero
policisto trude postulas Usonan monon el studentino
perfortita de Usona soldato.
Mi ankaŭ vidis, ke super la urbomuro de Kjujungkuan
du sangaj kapoj pendas,
kaj ĉe la bordo de muĝanta Jangze-Rivero
patriotojn oni dronigas en grensakoj,
dum en mia hejmurbo
la junuloj, kiuj estas nazmukuloj antaŭ dek jaroj
kaj interĵetis ŝtonetojn trans strato kun japanaj knabaĉoj,
nun ekprenis pafilon kaj grenadon
kaj svarmis al la montaroj.

Ho, patrolando!

en viaj riveroj fluis la sanglarmo de la popolanoj.
Sub viaj montoj enteriĝis la ostoj de patriotoj.
Nun ĉie kreskas ruĝaj floroj
sur la tero saturita de sango de viaj heroaj infanoj.

Pasis jam vìa longa nokto,
jen luma tago karesas kun suno kaj brizo.
Mi volas vivi cent jarojn
por vidi mian patrion plifortiĝi ĉiujare,
sed mi ankaŭ volonte batalmortos sur fronta posteno,
eĉ en tiu ĉi sama posttagmezo,
se malamikoj aŭdacus nin ataki en la mateno.

Nia popolo ĉiam amas martelon kaj falĉilon,
sed se iu ajn devigus nin levi fusilon,
ni estos kiel tigroj kaj lupoj timigaj.
Ni volas pacon
ne pro tio, ke ni estas malfortaj,
sed ĉar ni estas senkompare fortikaj.
La hieraŭa sklavo
jus liberiĝis hodiaŭ.
Kiu kuraĝus lin tuŝi je hareto,
tiun povos savi nenio.
Antaŭ lia vizaĝo
estas permesite al la malamiko nur fali,
sed ne aroganti.

Patrio, je via nomo mi sentas min plena de honoro,
ĉar mi apartenas al tiu nevenkebla popolo.
Mi ĉiam grumblos kontraŭ miaj gepatroj,
ĉar ili forlasis la patrion en sia jun'
kaj naskis min en fremda lando,
sed mi ankaŭ dankas ilin,
ĉar ili naskis min
en la glora epodo de Maŭ Ze-tung,
ke mi, kiel mil kaj mil aliaj,
laboru en la fruktarbejo de mia patrolando
por lasi la ombruman foliaron al posteuloj niaj.

Ho, patrolando!
viaj infanoj, kiel akcipitroj
defendos viajn landlimon kaj marojn
por doni pacon al viaj
nove kulturitaj kampoj
kaj fumantaj fabrikoj.

Donu al ni pacon!
Ni, kiuj malgajis rompinte vitron de komunuma posedo,
permesos al neniu rabisto
fari niajn urbojn kaj vilaĝojn de fajrego predo.
Nia Ĉaŭ Kuejlan preferis perdi sian manon
je la eksplodo de hidrarga fulminato

por savi la popolan fabrikon.
Niaj PLA-batalantoj manipulas sinsekve
pafilon, fosilon kaj penikon.
Ĵus ricevinte teron en agroreformo
la kamparanoj ĝoje celebras sian riĉrikolton.

Niaj vagonaroj veturas rekte
de Manĉoŭli ĝis Kantono,
kaj inter Hankoŭ kaj Uĉang
trans Jangze-Rivero
nova pontego staros kun impono.
Forton streĉu, ni popolanoj!
Ĉi tie
la turniĝo de ĉiu maŝino fabrika,
la kreskado de ĉiu spiko tritika,
de ĉiu vagonaro la kurado,
de ĉiu vaporŝipo veturado,
ĉiu ŝvitguto varma,
ĉiu manpar' senlaca
ion kontribuas al la laboro porpaca.

Mi nur scipovas manipuli plumon por ĵurnalo.
Mi volas detale rakonti kaj loki sur frontpaĝo
la novaĵon
pri la konkero super dektrijara inflacio;
mi volas detale rakonti kaj loki sur frontpaĝo
la novaĵojn
pri sesobla superproduktado de Nordorienta
industrio,
pri landskala bona rikolto de grenoj,

pri tio, ke lernejan edukon
ricevas infanoj
de laboristoj kaj kamparanoj.
Mi volas plenigi mian ĵurnalon
per novaĵoj pri laboroj de popolanoj
kaj heroaĵoj de popolanoj,
ke ĝi disvastiĝu tra la tuta mondo,
ke tremu la malamikoj
kaj aplaŭdu la amikoj.
Ĉio ĉi tio
estas deziro mia.
Kaj dekstre de la adicio
mi metas la vorton
Paco.
Kanti mi scipovis neniam,
sed nun mi volas kanti ĉiam
la plej fortan voĉon de Paco.

Elĉinigis **S. J. Zee.**

# APENDICO

I. Biografiaj Notoj pri la Aŭtoroj

II. Klarigoj

# I. Biografiaj Notoj Pri La Aŭtoroj

**TJEN KJEN** (田間) estas unu el la plej eminentaj figuroj en la Novpoezia Movado de Ĉinio. Li naskiĝis en Uvej-Gubernio de Anhuej-Provinco en la jaro 1917 kaj jam en sia 17-jara aĝo li aliĝis al la Ligo de Maldekstraj Verkistoj kaj komencis publikigi poemojn. Li sin ĵetis en la Novpoezian Movadon, kaj sub lia ĉefredaktora zorgo aperis la gazetoj *Nova Poezio* kaj *Literatura Gazeto*.

En la printempo de 1937 li forfuĝis al Japanio pro la persekutado fare de Ĉiang-Kajŝek-aj sekretaj agentoj. Post la eksplodo de la Ĉina-Japana Milito li revenis al sia patrolando kaj veturis al Ŝansi-Provinco, kie li aliĝis al la Korpuso de Surfronta Servo en la Nordokcidento sub la gvido de la fama verkistino Ting Ling. Multajn poemojn li verkis surfronte. Li iam funkciis kiel vicprezidanto de la Literatura Ligo,

konsilanto de Ŝensi-Kansu-Ningŝia-Limregiono, estro de la propagandaj fakoj de gubernia, regiona kaj municipala komitatoj de la Ĉina Komunista Partio. Por popularigi la novpoezion, li disvastigadis la movadon de Surstrata Poezio kaj verkis multajn epopeojn, mallongajn eposojn kaj stratajn poemojn. Grandan influon li havis en la Novpoezia Movado.

Inter liaj verkoj ni povas mencii la jenajn: *Ĉina Idilio, Al la Batalantoj, Odoj, Kolekto de Poemoj dum la Rezistmilito* (kolektoj de mallongaj poemoj); *Jung Kuan-ŝiu, La Ĉar-pelisto, Ruĝa Flago* (epopeoj); kaj la novelo *Almozpelvo.*

* * *

**ĈANG KING-TIAN** (張慶田) estas nun 29-jara kaj naskiĝis en Vuki-Gubernio de Hopej-Provinco. Antaŭ la Kontraŭjapana Milito li devis interrompi sian lernejan vivon post unujara lernado en mezlernejo. En sia 17-jara aĝo li partoprenis revolucian laboron kaj komencis agadi en organizado de loka armita forto, regionaj administra kaj eduka laboroj. Li estis foje vundita dum sia revolucia laboro. En la jaro 1948 li komencis verkadi, kaj li gajnis la Literaturan Premion de centra Hopej per sia dramverko *Honoro al Laboro.* Nun li laboras en la Literatura Fako de la Propaganda Departemento de la Hopej-Provinca Komitato de la Ĉina Komunista Partio.

* * *

**MOVADO** (馬凡陀) estas pseŭdonimo de la poeto Juan Ŝui-po (袁水拍), kiu naskiĝis en 1916 en familio de etbienulo en Suĉoŭ, Kiangsu-Provinco. Lia patro estis estro de vilaĝa elementa lernejo. Li finis sian mezgradan edukon, sed studis nur mallongtempe en universitato pro ekonomia malfacilo. Li komencis verki poemojn post la eksplodo de la Kontraŭjapana Milito, kaj eldonis poemarojn *Popolo, Vintro, Sunfloro, Bolantaj Jaroj* ktp., kaj ankaŭ tradukitan elektitan poemaron *Ho Mia Koro en la Alta Lando* de angla poeto Robert Burns kaj *Kolekto de Modernaj Pripoeziaj Traktatoj.* En 1946 eldoniĝis per la pseŭdonimo "Movado" populara poemaro *Idilioj de Movado* kies enhavo estas politikaj kaj sociaj satiroj. Lasttempe li entreprenis tradukon de moderna Usona poemaro kaj poemaron dum la Dua Mondmilito. En 1950 eldoniĝis de li tradukita poemaro de Ĉilia poeto Pablo Neruda. Nun li laboras en la redakcio de la *Popola Tagĵurnalo.*

* * *

**ŜE FANG-JU** (石方禹) ne estas profesia poeto. Nun li estas redaktoro de "The Shanghai News," anglalingva tagĵurnalo en Ŝanhajo. Li naskiĝis en Fukien-Provinco (福建省) en 1926. En la jaroj de 1946 ĝis 1948, kiam li studis en Jenking-Universitato (燕京大學) en Pekino, li aktive partoprenis en la tiaman studentan movadon kaj aniĝis al la glora Ĉina Komunista Partio. Dum la batalo kontraŭ malamikoj li verkis nemalmulte

da agitemaj poeziajoj kaj ricevis vastan aprobon de la studentoj. La poemo *La Plej Forta Voĉo de la Paco* estas la unua longa poemo kiun li verkis post la liberiĝo de Ĉinio. Ĝia originalo aperis en vol. III, n-ro 1 de *Popola Literaturo*, la plej granda literatura gazeto en popola Ĉinio.

# II. Klarigoj

**A.P.:** mallongigo de Associated Press, novaĵservo de Usono.

**bazuko:** anglalingve bazooka, speco de kontraŭtanka bombardilo.

**Ĉaŭ Kuej-lan:** nomo de modela laborheroino.

**fulminato:** eksploda salo (angle: fulminate of mercury).

**kindergarteno:** infanĝardeno.

**Kjujungkuan:** montpasejo de la Granda Muro.

**kuanjin-tero:** speco de tero kiu estis manĝata dum malsatego.

**Liu Hu-lan:** heroa juna kamparanino dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiun prikantas la dramo titolita per ŝia nomo.

**memelekto:** en Pingjuan-Provinco oni kutime nomas la memdecidan geedziĝon "memelekto."

**PLA:** Popola Liberiga Armeo.

**Plekti pajlĉapelan plektaĵon** estas la ĉefa krommetio de virinoj en Pingjuan-Gubernio.

**plunĝi**: sin ĵeti malsupren en (akvon).

**Ruĝas Oriento**: la plej bone konata kanto en Ĉinio gloranta la nomon de Prezidanto Maŭ Ze-tung.

**SAKO**: legu "SAKO", mallongigo de "Sino-American cooperative Organization" (Ĉina-Usona Kooperativa Organizo).

**U.P.**: mallongigo de United Press, granda novaĵservo de Usono.